

Lingvo *Internacia*



Duonmonata gazeto

por

Esperanto

eliranta la 1-an kaj 15-an de ĉiu monato

~~~~~  
*XI-a Jaro*  
~~~~~

PARIS V^e

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, Rue Lacépède, 33

ONI ABONAS L. I. ĉe:

a) oficejo de la gazeto en **Paris**, — b) S-ro *P. Ahlberg*, Sekretario de Klubo Esperantista, en **Stockholm**, (Svedlando), Döbelnsgatan 50, — c) S-ro *Manuel Benavente*, Sociedad 14, **Murcia**, (Hispanlando), — d) S-ro *K. Ostanievič*, «Kontoro Esperantista», en **S.-Peterburg** (Ruslando) Jaščik 80, — e) Societo «*Esperon*» en **S.-Peterburg** (adr. D-ro *A. I. Asnes*, Bolšaja Podjačeskaja, d. 24. kv. 12.), — f) Firmo *Möller & Borel*, Prinzenstrasse 95, **Berlin S.** (Germanlando), — g) Firmo *J. Lindauer'sche Buchhandlung (Schöpping)*, Kaufingerstrasse 29 **München** (Bavarujo). — Oni sendu abonmonon nur al unu el tiuj ĉi sinjoroj resp. firmoj, aŭ al redakcioj de gazetoj aŭ sekretarioj de grupoj esperantistaj.

Jara abono: sen literatura aldono **5 frankoj**, kiun sumon oni sendu laŭeble per poŝta mandato. (Por papermonoj ni kalkulas: 5 frankoj = 2 rubloj = 4 germ. markoj = 4 ŝilingoj = 1 dolaro = 2,50 hol. floreno = 4 skand. kronoj = 5 aŭstro-hungaraj kronoj.) — Kun literatura aldono **7,50 fr.**

Prezo de ĉiu numero 40 centimoj; numero de la Kongreso: 60 centimoj.

Pago por anoncoj: 40 centimoj por linio (kompostita el «petit» presliteroj); ĉe pli granda anoncado estas donata rabato laŭ reciproka konsento. Malgrandajn nekomercajn anoncojn ni presas por niaj abonantoj po dudek centimoj por linio. Rabato por almenaŭ ses presoj: 10 %.

La ŝanĝo de adreso kostas 50 centimojn.

Poŝtmarkoj estas akceptataj nur por $\frac{3}{4}$ de ilia valoro.

Samuel Goldrag, *Varsovio* (Rusa Pollando), strato Krochmalna, n° 31, deziras korespondadi kun nord-amerikaj geesperantistoj.

F. SKOG, *N. Kyrkobacken*, **FALUN** (Svedujo), deziras korespondadi poŝtkarte aŭ letere kun juna germano, hungaro, italo, ruŝo aŭ neeŭropano.

Koran dankon al la estimindaj kongresanoj **SS. Attila, Evstifeev, Grünfeld, Kabe, Naumann, Saĥarov, Ŝmurlo, Talleno, Venjukov, Zinovjev**, kiuj bonvolis sendi al mi kortuŝindan saluton de la 2-a Kongreso. — S-ro Evstifeev sendube scias pri mia vana serĉado. — **A. KOFMAN.**

Florence MEIGH, *Ash Hall, Stoke-on-Trent* (Anglujo), deziras interŝanĝi ilus. p. k. kun Aziaj kaj S. Amerikaj esperantistoj.

S-ro **ARTHUR E. BAKER**, General Delivery, Oklahoma, *Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko*, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun ĉiuj gesamideanoj. Ĉiam kaj tuj respondos. Ĉiuj kartoj sendataj estos uzataj por disvastigadi la lingvon.

SALVADOR CASANOVAS, str. Manso, 76, Barcelona (Katalunujo), España. — Deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun alilandaj geesperantistoj.

Lingvo Internacia

Duonmonata organo en Esperanto

Redakcio kaj administracio : PARIS, 5-e Arr., 33, rue Lacépède, 33

I septembro 1906

Selma Lagerlöf : La Almozulo (tradukis JOHN LUNDGREN) *daŭrigo kaj fino*. 473

P. Champion : Terkultura Kalendaro 479

Tra la Mondo Esperantista :

Cirkulero III-a de la Organiza Komitato de la Ekspozicio Internacia Stenografia Szegeda. 484

Bibliografio : Nova hungara propaganda libro. — Esperantaj lerniloj por Bohemoj 485

Monoferoj por la Blinduloj . 488

Nia aldono literatura (paĝoj 257-272) : **Veto**, de A. ČEHOV (tradukis BORISO KOTZIN), *fino*. — **Por kaj kontraŭ Esperanto**, de D-ro VALLIENNE, *komenco*.

LA ALMOZULO

El « *Legendo de Gustavo Berling* » de sveda verkistino **Selma Lagerlöf**
(*Daŭrigo kaj fino*).

Tiam ŝi batis pugnon sur la tablon, kaj lasis lin klare aŭdi ŝian opinion.

« Nu, nu, vi deziras morti. Multe mi ne mirus se vi efektive vivas. Vidu tian malgrasan korpon, kaj tiajn malfortajn membrojn, kaj tiajn senbrilajn okulojn, kaj tamen vi kredas ke io restas, kion vi povas mortigi! Ĉu vi pensas, ke mortulo necese devas kuŝi rigida sub supernajligita ĉerkokovrilo? Ĉu vi ne komprenas, ke mi vidas kiom morta vi jam estas, Gustavo Berling? »

Mi vidas ke vi havas kranion kiel kapon, kaj mi sentas, kvazaŭ vermoj elrampas el viaj okulkavernoj. Ĉu vi ne sentas, ke vi havas teron en la buŝo? Ĉu vi ne aŭdas kiel la ostoj tintas, kiam vi ekmovas.

Vi vin dronigis en brandon, Gustavo Berling, kaj vi estas mortinta.

Tio, kio nun sin movas ĉe vi, estas nur skeleteroj, kaj vi malenvias al ili vivon, se vi tion ĉi nomas vivo. Estas kvazaŭ vi ĵaluzas al la mortintuloj pri danco sur tomboj en lumo de la steloj.

Ĉu vi hontas pro via eksigo, kaj sekve nun deziras morti? Estus pli honora, se vi uzus viajn talentojn, kaj fariĝos pli utila; tion mi certigas. Kial vi ne venis tuj al mi, por ke mi ĉion ĝustigu? Ho! Nun vi eble atendas multan honoron pro envolvigo, kaj esti kuŝigata sur segaĵon, kaj nomata malvivulo bela. »

La almozulo kviete sidas, preskaŭ ridetante, dum ŝi eltondris sian malafablan parolon. « Nenia danĝero », li ĝojegis, « nenia danĝero! La ceteraj arbaroj atendas, kaj ŝi ne havas povon forlogi mian animon de tie. »

Sed la majoredzino silentiĝis, kaj iris kelkajn fojojn laŭlonge la ĉambro. Tiel ŝi sidiĝis apud la kameno, metis la piedojn sur la kavernrandon, kaj apogis la kubutojn sur genuo.

« Mil diabloj! » ŝi blasfemis kaj mallaŭte ridis. « Estas pli multe da vero, kion mi diras, ol mi mem observas. Ĉu vi ne kredas, ke Gustavo Berling, ke plej multaj homoj en tiu ĉi mondo estas aŭ mortintaj aŭ duonmortintaj? Ĉu vi pensas, ke mi mem vivas? Ho ne! Ho ne!

« Nu, vidu min! Mi estas la majoredzino de Ekebi, kaj vere mi estas plej aŭtoritata sinjorino en Vermlando. Se mi faras signon per unu fingro, la provincestro kurus, kaj, se mi signas per du, la episkopo kurus, kaj, se mi eksvingas tri fingrojn, tiam ambaŭ eparĥiestraro kaj magistratanoj kaj ĉiuj farejposedantoj en Vermlando dancus polan dancon sur la placo en Karlstad¹⁾. Mil diabloj, bubo! Mi diras al vi, ke mi mem ne estas alio, ol vestita malvivulo. Dio scias, kiom malmulte da vivo estas en mi. »

La almozulo antaŭenkliniĝis, kaj aŭskultis atente. La maljuna majoredzino sidis balancete antaŭ la fajro. Ŝi ne vidis al li, dum ŝi parolis.

« Ĉu vi ne kredas », ŝi daŭrigis, « ke, se mi estus viva homo, vidante vin tie ĉi, mizeran kaj malĝojigan kun intenco pri memmortigo, ĉu vi ne kredas, ke mi en momento ekster-

(1) La provinca ĉefurbo.

mi tiun intencon el vi? Tiaokaze mi havus larmojn por vi, kaj preĝojn, kiuj nepre ŝanĝigus vin, kaj mi savus vian animon; sed nun mi estas mortinta.

Cu vi aŭdis, ke mi iam estis bela Margareta Celsing? Ne estis hieraŭ, sed ankoraŭ mi povas plori pri ŝi ĝis miaj maljunaj okuloj ruĝiĝas. Kial estas Margareta Celsing mortinta kaj Margareta Samzeius vivanta, kial majoredzino de Ekebi vivas? Respondu, Gustavo Berling.

Cu vi scias pri Margareta Celsing, kia ŝi estis? Si estis gracia kaj ĉarma kaj modesta kaj senkulpa. Si estis tia, sur kies tombo la anĝeloj ploras.

Si konis nenian malbonon, neniu faris al ŝi doloron, ŝi estis afabla al ĉiu. Kaj bela ŝi estis, vere bela.

Estis bonaperanta viro, kies nomo estis Altringer. Por ia afero li vojaĝis en la neplugita regiono de Elvdalen, kie ŝiaj gepatroj havis sian farejaron. Lin vidis Margareta Celsing; li estis belega, ĉarmega viro, kaj li amis ŝin.

Sed li estis malriĉulo, kaj ili interkonsentis atendi reciproke dum kvin jaroj, kvazaŭ diras kanteto.

Kiam tri jaroj pasis, alia viro ŝin svatis. Li estis malbela kaj malagrabra, sed ŝiaj gepatroj kredis, ke li estas riĉa, kaj per logado kaj trudado, per batoj kaj malafablaj vortoj ili devigis Margareton Celsing'on akcepti lin por edziĝo. Tiun tagon Margareto Celsing mortis.

Poste neniam Margareto Celsing ekzistas, nur majoredzino Samzelius, kaj ŝi estas nek bona nek modesta; ŝi multe spertis da malboneco kaj malatentas bonajn aferojn.

Vi certe scias tion, kio poste okazis. Ni loĝis sur bieno Seo, tie ĉi apud Leven, la majoro kaj mi. Sed li ne estis riĉa, kvankam homoj diris tion. Mi ofte havis malgajajn tagojn.

Tiam revenis Altringer, estanta riĉa. Li fariĝis posedanto de Ekebi, kiu kuŝas apud Seo. Li akiris ses aliajn farejarojn apud Leven. Li estis taŭga, agema, ĉarma viro.

Li helpis nin en nia mizero: ni veturis per liaj veturiloj, li sendis manĝaĵon en nian kuirejon, vinon en nian kelon. Li plenis mian vivon per festenoj kaj amuzajoj. La majoro foriris en militon, sed tio ne ĉagrenigis nin. Ian tagon mi gastis Ekebi'on, alian tagon li veturis Seon. Ho, estis kvazaŭ longa vico da plezuroj ĉirkaŭ la bordoj de Leven.

Sed disvastiĝis malbona famo pri Altringer kaj mi. Se

Margareta Celsing vivis, ĝi multe dolorigus, ŝin, sed mi sentis nenion. Tamen mi ankoraŭ ne komprenis, ke mi estas mortinta, kaj do sensenta.

Tiel venis la ĉikano pri ni al miaj gepatroj, kie ili vagadis inter la karbigejoj en la arbaro Elvdala. La maljunulino ne longtempe meditis; ŝi tuj vojaĝis tien ĉi por paroli kun mi.

Si alvenis ian tagon, kiam la majoro estis for, kaj mi sidis ĉe la manĝado kune kun Altringer kaj multaj aliaj. Mi vidis ŝin eniri la salonon, sed mi ne povis senti, ke ŝi estas patrino mia. Mi salutis ŝin kiel fremdulinon, kaj invitis ŝin sidiĝi ĉe mian tablon kaj partopreni la manĝadon.

Si provis paroli kun mi kvazaŭ mi estas ŝia filino, sed mi certigis, ke ŝi eraris; miaj gepatroj estas mortintaj, ili estas mortintaj de mia edziniĝa tago.

Si akceptis la ludon. Sepdekjara ŝi estis, dudek mejlojn ŝi veturis en tri tagoj. Sen ia dubo ŝi sidiĝis ĉe festenan tablon kaj prenis manĝaĵon; ŝi estis fortega virino.

Si bedaŭris, ke mi suferis tian perdon ĵus en tiu tago.

„Plej bedaŭrinde estis”, mi diris, „ke miaj gepatroj ne mortis en antaŭa tago, ke la edziĝo ne okazis.”

„Ĉu la major-sinjora moŝto do ne kontentas pri sia edziĝo?” ŝi demandis sekve.

„Nun mi kontentas”, mi respondis. „Mi ĉiam kontentos kaj obeos volon de miaj gepatroj!”

Si demandis, ĉu estis volo de miaj gepatroj, ke mi amasigu malhonoron sur min mem kaj sur ilin, kaj trompu mian edzon. Malmultan estimon mi vidigas al miaj gepatroj, kiam mi faras min insultinda por ĉiuj homoj.

„Ili kuŝu, kiel ili sternis”, mi respondis. „Kaj cetere la fremda sinjorino devas kompreni, ke mi ne permesas ke iu insultas filinon de miaj gepatroj.”

Ni manĝis, ni du. Ĉirkaŭ ni la viroj silentis, kaj ŝajne ili ne povis levi nek tranĉilon nek forkon.

La maljunulino restis por ripozi ĝis morgaŭa tago, kiam ŝi reveturis.

Sed tiel longe, kiel mi vidis ŝin, mi ne komprenis, ke ŝi estis mia patrino. Mi nur sciis, ke mia patrino estas morta.

Kiam ŝi estis preta forvojaĝi, kaj mi staris apude sur la perono, kaj la veturilo estis antaŭenigita, ŝi diris al mi:

„Tagon kaj nokton mi restis tie ĉi, kaj vi ne salutis min

kiel patrinon. Laŭlonge dezertaj vojoj mi veturis tien-ĉi, dudek mejlojn en tri tagoj. Pro honto mia korpo skuiĝas kvazaŭ batis per branĉeto. Vi estos neakceptata kaj rifuzata kiel mi estas! La kampara vojo estos via hejmo, pajla amaso via lito, la karbigejo via kameno! Honto kaj insultado estos via salajro, aliaj batos vin kvazaŭ mi vin batas!”

Kaj ŝi perforte batis min sur vangon.

Sed mi ŝin ekleviis, portis ŝin malsupren laŭ la ŝtuparo, kaj metis ŝin en la veturilon.

„Kian rajton vi havas malbeni min?” mi demandis, „kian rajton vi havas bati min? Tion mi ne toleras de iu!”

Kaj mi redonis al ŝi la vangbaton.

La veturilo forrulis en sama momento, kaj mi ekkomprenis, ke Margareta Celsing estas mortinta.

Si estis bona kaj senkulpa, ŝi konis nenian malbonecon. La anĝeloj ploris sur ŝia tombo. Se ŝi vivis, ŝi ne batus sian patrinon. »

La almozulo aŭskultante sidis apud la pordo, kaj por momento la vortoj silentigis la logantan sonon de l'eterne bruantaj arbaroj. Jen, tiu ĉi aŭtoritata sinjorino sin faris simila al li je peko, kaj egala je pereco, ĉio por instigi lin vivi. Tiel li devas lerni, ke doloro kaj kulpo ŝargas ankaŭ aiajn ol li mem. Li stariĝis kaj iris al la majoredzino.

« Cu vi nun volas vivi, Gustavo Berling », ŝi demandis per voĉo, kiun larmoj balbutigis, « kial vi mortus? Eble vi farigus bona pastro, sed tiu Gustavo Berling, kiun vi dronigis en brando, neniam estis tiom bele blanka je senkulpeco, kiel Margareto Celsing, kiun mi sufokis per malamo. Cu vi volas vivi? »

Gustavo surgenuiĝis antaŭ la majoredzino.

« Pardonu min », li diris, « mi ne povas. »

« Mi estas maljuna virino, sperta de multe da doloro », respondis la majoredzino, « kaj jen mi sidas trohumiligante min antaŭ almozulo, kiun mi trovis duone glaciiginta en neĝo de l'vojrandoj. Estas justa sorto por mi. Vi iru kaj mortigu vin mem, ke vi almenaŭ ne povos rakonti al iu pri mia malsaĝeco. »

« Majoredzino, mi ne estas memmortigonto, mi estas kondamnita morti. Ne faru al mi la pereigon tro malfacila! Mi ne povos vivi. Mia korpo potencas mian animon, tial mi lasos ĝin iri al Dio. »

« Nu, ĉu vi kredas ke ĝi venos tien? »

« Adiaŭ, majoredzino, kaj dankon! »

« Adiaŭ, Gustavo Berling. »

La almozulo leviĝis, kaj iris kun antaŭenklinita kapo kaj per lacaj paŝoj al la pordo. Tiu ĉi virino malfaciligis la iradon al la grandaj arbaroj.

Kiam li estis veninta la pordon, li devis vidi malantaŭen. Tiam li ekvidis rigardon de l'majoredzino, kie ŝi senmove sidas vidante al li. Pli frue li neniam vidis tian ŝanĝon de vizaĝo, kaj li ekhaltis rigardante ŝin. Si, kiu koléris kaj minacis, nun sidas en senmova brilapero, kaj ŝiaj okuloj brilas pro kompatema amo. Estis io interna, io en lia sovaĝiĝinta koro, kiu rompiĝis pro ŝia rigardo. Li apogis la frunton sur pordfoston, kovris la kapon per la brakoj, kaj ploris tiom, kvazaŭ la koro ne tolerus.

La majoredzino ĵetis la argilpilon en la kamenon, kaj venis al Gustavo. Ŝiaj movoj graciĝis subite, kvazaŭ tiu de ia patrino.

« Nu, nu, knabo mia! »

Kaj tuj ŝi metis lin apud si sur benkon apud la pordo, tiel ke li ploris kun la kapo sur ŝia genuo.

« Ĉu vi ankoraŭ deziras morti? »

Tiam li volis suprenĵetiĝi. Si devis haltigi lin perforte.

« Nun mi diras, ke vi povos fari kiel ajn vi volas. Sed tion mi promesas al vi, ke, se vi volas vivi, mi prenos al mi filinon de l'Brobi-pastro, kaj edukos ŝin, ke ŝi povos danki Dion pro via ŝtelo de ŝia faruno. Nu, ĉu vi volas? »

Li levis la kapon kaj rigardis ŝiajn okulojn.

« Ĉu tio estas vero? »

« Estas tiel, Gustavo Berling. »

Li ektordis la manojn agonie. Li kvazaŭ vidis antaŭ si la exploremajn okulojn, la kunpremitajn lipojn kaj la malgrasajn malgrandajn manojn. Tiu ĉi junulino estos do ŝirmata kaj zorgata, la signoj de malnobleco estos forigataj de ŝia korpo, la malboneco el ŝia animo. La vojo al la eternaj arbaroj nun estis barita por li.

« Mi ne mortigos min en tiu tempo, en kiu vi zorgos ŝin, majoredzino », li diris. « Mi sentis, ke vi devigos min vivi. Mi tuj sciis, ke vi havas potencon super mi. »

« Gustavo Berling », ŝi serioze diris. « Mi batalis por vi, kvazaŭ por mi mem. Mi diris al Dio: „Se el Margareto Celsing io restas vivanta en mi, vi permesu, ke ŝi aperigos, por ke tiu

ĉi viro ne foriros mortigonte sin! Kaj li permesis tion, kaj vi vidis ŝin, kaj tial vi ne povis foriri. Kaj ŝi mallaŭte diris al mi, ke vi por la malfeliĉa infano ĉesos vian intencon morti. Vi flugas kuraĝe, vi sovaĝaj birdoj, sed nia Sinjoro havas kaptilon por vi. »

« Estas granda kaj mirinda Dio », Gustavo Berling diris. « Min li kondamnis, sed li ne volas ke mi mortos. Lia volo do fariĝos! »

De tiu ĉi tago Gustavo Berling estis unu el la kavaliroj de Ekebi. Du fojojn li provis veni de tie, kaj per propra laboro meriti siajn bezonaĵojn. Ĉe ia okazo la majoredzino donacis al li farmeton proksiman de Ekebi; li tien loĝiĝis kaj intencis vivi kiel laboristo. Tio prosperis en iom da tempo, sed baldaŭ li lacigis per la soleco kaj la ĉiutagaj klopodoj, kaj ree li fariĝis kavaliro. Alian okazon li fariĝis instruisto en Borg por grafo Henriko Dohna. Tiun tempon li enamigis en juna Ebba Dohna, fratino de l'grafo, sed, ĉar ŝi mortis ĵus kiam li kredis, ke li baldaŭ gajnos ŝin, li forlasis ĉiun penson fariĝi alia ol kavaliro ĉe Ekebi. Sajnis al li, kvazaŭ ĉiu vojo al rekorektiĝo estas barita por eksigita pastro.

Esperanten transskribis JOHN LÜNDGREN.

Terkultura Kalendaro.

SEPTEMBRO

Antika poeto personigas Septembron per la figuro de nuda homo, nur havanta sur ŝultro mantelon balanciĝantan laŭ la vento. **Gi tenas en maldekstra mano lacerton alligitan je ŝnuro,** kaj baraktantan en aero. Sube de la dio estas du kuvoj preparitaj por la vinrikolto.

La nuntempuloj pentras Septembron kun ridanta vizaĝo, kronitan per vinberujaj foliataj branĉoj, vestitan per purpuraĵo, tenante pesilon per unu mano, kaj per la alia kornon da sufiĉego, el kiu forflugas vinberoj kaj fruktoj. Ĉu ili ne forgesis unuj kaj aliaj emblemon tre gravan pri Septembro, ian ĉasistandion ekzemple, kiel Diano, akompanata de ŝia leporhundo.

Ĉar Sepetembro estas la unua ĉasa monato, kaj eble la plej agrabla el ĉiuj sekvontaj.

Iam Perdo kaj Miro, la du malnovaj ĉashundoj de mia amiko, vidiĝas malpaciencaj kaj avidaj trairi kuregante la kampojn kaj arbarojn. Ili ambaŭ jam ekflaras la persekutotan beston: unu el ili, teristo (terrier), kun mallongaj kruroj, grasa, flavruĝa, kun ronda nazo, kun larĝaj kaj trenigantaj oreloj; la alia, kuranta hundo, alta sur piedetoj, dika, muskola, kun ripoj elstarantaj; kaj li ankaŭ, mia amiko, malpacienca estas, antaŭgustumanta la kortuŝantajn estontajn mortigojn de l'ĉasaĵo.

Mi certe ne priskribos al vi liajn senĉesajn iradojn tra la pinaro aŭ tra la herbejo. Necese estas ke oni aŭskultu lin rakontantan pri siaj heroaĵoj. — Mi ĵus estis tie ĉi — tuj alvenas perdrikaro — mi faris paf, pafon! — kaj kvin perdrikoj mi ensakis. — Tre senprudenta leporo sin montras — paf! — kaj mi ensakas denove. — Mi ĉiam memoras pri pentraĵo kiun eble vi konas. Du ĉasistoj revenas alportante leporon al kuiristino. Tiu ĉi flarante (kial ne?) la beston, kaj ŝtopante tuj al si la naztruojn, ekkrias: ĝi estis en la momento ĝin mortigi! — Al lertaj ĉasistoj neniam mankas ĉasaĵo.

Se la vivado pli ĉarma ŝajnas nun al ĉasistoj ĝi malvolviĝas ankaŭ pli facila, (tial ke malpli kosta ol iam) por ĉiuj; kaj vi rapide konvinkiĝos pri tio se vi nur eniros urban vendejon. Tien ĉi vere ĉia bonaĵo alfluas, ne nur el ĉasaĵo kaj arbaroj, sed ankaŭ el fiŝriĉaj riveretoj kiel same el maro, donantaj kankrojn, angilojn, ĉiuspecajn fiŝojn; el sufiĉegaj fruktoĝardenoj liverantaj nian bongustan deserton; el kverkaretoj, kaŝtanjaroj, pinaretoj, plenaj je multegaj fungoj, trufoj, tiel agrable miksiĝantaj en bolpoto kun la ruĝaj perdrikoj aŭ la birdetoj stipaj... Aldonu tiam helan vinberosukon, defluantan el niaj sunigitaj montetoj, kaj... la tablo estas tute provizita.

Cu vi ne aŭdas la kanton de l'vinberistoj, ĉar la vinberujo fine malfermiĝis, kaj la salika korbo pleniĝas je vinberoj. — Rapidu, vinberisto, imitu la abelojn kiuj rapidas ĉirkaŭ ĉiaj ruĝegaj beraroj — enigu ciajn nervajn brakojn en la dorskorbojn, kaj ĝoju tial ke hodiaŭ vespere ciaj kuvoj estos plenigitaj. Hodiaŭ vespere, la premiloj restos malfermitaj kaj ĉiuloke, en vilaĝo, dolĉega ŝvito de premitaj vinberoj, haladzo varma de ekfermentantaj vinoj enmiksiĝis kun la odoro de l'kokejoj kaj staloj.

Ciu prudenta vinberisto nature antaŭzorgis de longe pri la kuvoj, kiujn li kalkigis (chauler), pri la bareloj kiujn li trinkigis per sufiĉega akvo. Per unu vorto, li preparis ĉion, kio estas necesa al vinrikolto.

Plej ofte vinberisto estas terkulturisto, kaj duoblan penadon suferas liaj jungbestoj. Vi ne forgesos do ilin, pensante ke, ĉar ili pli laboradas kaj laciĝas en tiu monato, ili ankaŭ pli ol iam bezonas sufiĉegan kaj fortan nutraĵon. Vi povos doni al ĉevaloj novan fojnon kaj freŝan akvon, sed vi zorge evitos la postfojnon nove rikoltitan; ĝi estus certe malutila: Seka furaĝo kun miksaĵo de radikoj taŭgas por bovoj. Tre atentajn zorgojn postulas la ŝafoj, kiujn minacas ofte akva kakeksio (cachexie aquense?) aŭ putraĵo (pourriture). Ili profite sin paŝtos per la laste falĉitaj trifolioj, aŭ per la dua rikoltaĵo de la malnovaj onobrikoj.

Kondukigu la porkojn en glanejojn; tre zorgu pri kokinoj kaj kolomboj (pro la ŝanĝiĝo de plumoj). Por faciligi tiun ŝanĝiĝon, alportu al viaj kortbirdoj fortigantan manĝaĵon: grenon, maizon, avenon, poligonon, pastaĵojn enhavantajn kalkanfosfaton; aldonu intertempe kelkajn restaĵojn de kuiritaj viandoj. sendu la meleagrojn postrikolti sur la pajlokampojn; paŝtu la anserojn sur la herbejoj, kaj reenirinte domon, donu al ili, kiel same al anasoj, hordeon kaj maizon.

Poste, ni tuj revenos iomete, se plaĉos al vi, en ĝardenon, kies fruktojn vi jam kolektis, aŭ kolektas ankoraŭ... Vi duafoje fosetas la plantejojn de la fruktaj arboj; vi pinĉas la persikujojn; kaj en la legoma ĝardeno, vi kolektas la tutan maturan semadojn, bulbojn, terpomojn, duone malfruajn, senŝeligotajn fazeolojn; vi semas la vintrajn laktukojn, nigrajn rafanetojn, spinacojn; vi plantas brasikojn por la vintro; vi plugas kaj sterkas la neokupitajn angulojn; vi kovras cikoriojn kaj salatojn, pro la timo de la blankaj frostoj; mallonge vi devas fini la semadojn, plantadojn, repikadojn.

En la kamparo plej granda zorgo de ĉiu atenta terkulturisto estas tiam prepari la semojn. Antaŭ ĉio li bezonas elekti nepre maturajn grenojn, longatempe forlasitajn en la kampoj, kaj tute ŝirmitajn kontraŭ la malsekeco.

Necesega antaŭa farotaĵo konsistas el kalkigo, ĉu per kuprosulfato aŭ vitriolo, ĉu per sodosulfato, ĉu per akvigita (hydraté) kaj sala kalko, aŭ per sulfura acido (vitriolo). Oni tro

scias ja la difektaĵojn kiuj kaŭzas en la nekalkigitaj grenoj multe da malsanoj kiel putrado, karbo (charbon), rustaĵo, sekal-malsano ktp.

Pri la vitrioligo oni uzas kutime unu kilogr. da kuprosulfato en unu hektolitro da akvo.

Kaj vi ne prokrastos veturigi la sterkon sur la terojn difitajn por la vintraj grenaĵoj, kalkon, cindrojn, sterkakvaĵojn, sur la kolzojn, napbrasikojn, trifoliojn. Oni enterigas la verdajn grasigaĵojn, oni fosetas aŭ plugetas la kolzojn kaj napbrasikojn por malaperigi la parazitajn herbojn.

La teroj semotaj je grenoj estos funde plugitaj, sed oni ne semas en ĉiuj lokoj dum la sama tempo. Pri la semada momento ni konsilas nur uzi la favoran tempon, frue semante. Bone semita greno estas duone rikoltita, diras la Beauceanoj.

Oni semas ankoraŭ dum Septembro: sekalon, tre fruajn tritikojn, hordeojn (nome la trofruan hordeon verde manĝotan), grizajn vintrajn pizojn, blankan sinapon, vintrajn fabetojn kaj avenojn. Oni repikas furaĝajn brasikojn, kolzojn, rutobagasojn. Oni draŝas grenojn.

Oni rikoltas la terpomojn, printempajn fabetojn, poligonon, kaj la maizon, kies grandan parton oni enfosas; pri tiu ĉi lasta vi rimarkos ke la brutaro plezure, eĉ avide, manĝas ĝiajn berarojn nove draŝitajn.

La postfojno en la dufoje falĉitaj herbejoj, la trifolioj kaj luzernoj plej ofte tiam estas rikoltataj; ĉiuj fariĝas por la grasigotaj bovoj, por la bovinoj kaj ŝafinoj, la plej bona el sekaj furnaĵoj.

Ni jam ekvidis ke la varmgrado malaltiĝis je proksimume kvar gradoj de la Aŭgusta monato. Pli oftaj jam estas la pluvoj, kaj nebuloj ekmalsekigas la kamparon. Tial la tero de l'arbaroj ĉar ĝi konservas malsekan varmon, naskas la multegajn fungojn pri kiuj ni jam aludis. Ĉie aliloke la naturaj kreskaĵoj ekmalmultiĝas. « La bela dianto tamen malvolvas ankoraŭ la rozajn frangojn de siaj florfolietoj; l'astero altigas sur la montetoj siajn orajn ekkreskaĵetojn ĉirkaŭantaj per bluaj radioj, apud la bukedaĵoj oranĝaj beraroj de la Linotiriso. Pala floreto, ŝajnanta malsana, jam aperas en herbejoj: ĝi estas la kolhiko (colchique), kies siringviolaj kronetoj, evazigitaj (evasées) kiel tiuj de l'tulipoj naskiĝas senfloraj kaj ne ŝirmitaj. La herbo nur protektas ilin kontraŭ la aŭtunaj ventoj, ĉar ilia floro apartenaŝ al bulbo

profunde enfosita en tero, kaj varme vindita per kunmetitaj tunikoj. » H. Lecoq.

Ni devas do niajn ĝardenajn florojn... ekvesti, tio estas ilin antaŭgardi kontraŭ la unuaj malvarmetoj; tial ni finos donante la jenajn konsilojn al floristo.

Vi povos de nun ne tiel zorge surverŝi la diantajn markotojn, se nur ili estas tute enradikigitaj, kaj vi ekplantas kelkajn bulbojn, promesplenajn je estontaj floroj. La markotoj de la elektitaj diantoj tuj kiam ili estas elprenitaj el ĉefkreskaĵo, repikataj estos en potojn aŭ en teron, laŭ la devenoj, ĉar la realtigantaj diantoj ĉiam postulas esti ŝirmataj per malvarma kesto.

Plantu en potojn: narcisojn, krokusojn, jacintojn, tulipojn, kiujn vi plenaere lasos, ĝis kiam vi replantos ilin (kun iliaj potoj) en varman bedon, kie ili floros dum vintro. Vi uzos, por ilin grasigi, kunmetitaĵon de bovina sterko nepre dismetita kun pura teraĵo.

Vi semos ankoraŭ plentere kaj loke la jenajn jarajn kreskaĵojn, kiuj ekfloros frue kaj bele en la venonta printempo: adonidon, bonodoran alison, bluan, sovaĝajn papavojn, senmortal-aĵojn (Immortelles), diantojn, lekantetojn, violojn, floksojn, ĝardenajn primolojn, kalendulojn ktp.

Vi loke plantas la plejmultajn persistajn kreskaĵojn, devenantajn de la semadoj antaŭfaritaj dum aprilo, majo aŭ junio; vi multigas ankaŭ geraniojn, verbenojn, ruĝegan salvion, Begoniojn ktp., kiujn vi konservos dum la vintro sub kesto vitraĵa aŭ en malvarma ĉambro por la printempa venonta plantado; vi plantas en masivoj multajn, multegajn bulbajn kreskaĵojn.

Generale, pli bone estas planti la persistajn kreskaĵojn dum aŭtuno, tial ke, malfrue, dum vintro, ili profitas la belajn tagojn, donante novajn radikojn, tutpretajn pleneveĝeti kiam aperos la printempo.

En tiu monato la krisantemoj plej forte kreskadas, kaj iliaj fruaj diversaĵoj ekaperigas siajn kreskaĵetojn. — Akvajn grasigaĵojn malŝparu pri ili.

— Pri la kelo ni aldonas la jenan vorton: tien ne loku novajn vinojn kie jam estas malnovaj, ĉar tiuj ĉi povus ekfermentiĝi.

Kaj pri la belega nova kreskaĵo Esperanto ni atendas ankoraŭ la Genevan ekspozicion.

PAUL CHAMPION.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Cirkulero III-a de la Organiza Komitato de la Ekspozicio Internacia Stenografia Szegeda.

Ni dankas niajn samideanojn, kiuj bonvolis sendi al ni interesajn kaj gravajn sendaĵojn, kaj ni petas niajn estimatajn samideanojn plenumi la sekvantajn:

1) L'aŭtoroj de stenografiaj sistemoj alfarintaj por Esperanto, bonvolu sendi al ni siajn verkojn ĉu prese ĉu manuskripte; kaj tiuj, kiuj ĉi tion jam sendis, kaj la aliaj, bonvolu aldoni al iliaj sendaĵoj unu verketon pri la historio de iliaj sistemoj, pri ĝiaj ĉefprincipoj por la disvastigado de la alfaro (kluboj, gazetoj, rondirantaj folioj, ekspozicioj, proksimuma nombro de iliaj anoj k. t. p.) Tion ĉi ni uzos por verketo, redaktota de S-ro L. JAKAB, « *Historio kaj detala kritiko de l'sistemoj stenografiaj Esperantaj.* »

2) El ĉiu lando ni bezonas po unu samideano, kiel *nacia sekretario* de nia Ekspozicio.

Tiuj estimataj samideanoj, kiuj bonvolos fari ian servon al nia Ekspozicio, do kune al la ideo de Stenografio kaj Esperantismo, bonvolu skribi al S-ro L. JAKAB, prezidanto de l'*Szeged'a Stenografia Societo kaj Organiza Komitato de l'Ekspozicio* (Szeged, Hungarujo, Fertő-utca 4). Iliaj taskoj estos: propagandi nian Ekspozicion inter la stenografistaro kaj Esperantistaro, inter la naciaj stenografiaj gazetoj, kluboj per vorto kaj skribo, kolekti la ekspoziciindajn objektojn de iliaj samlandanoj. Jam antaŭe ni salutas tutkore tiajn samideanojn, kiuj bonvolos entrepreni tiun ĉi helpon — eble malfacilan, sed nepre sukcesplenan, — farante grandan servon al niaj samideanoj.

3) Ni petas fine ĉiujn niajn samideanojn, ankaŭ la nestenografistajn, ili bonvolu el sia tuta forto propagandi nian Ekspozicion en naciaj ĵurnaloj kaj sciencaj revuoj. Ĉar tiu-ĉi Ekspozicio estas la *unua* kies tuta organizacio kuŝas sur fundamentoj de nia komuna Esperanto, kies oficiala, korespondanta lingvo es-

tas: *Esperanto*. Nia Ekspozicio estos bonega propagandilo ne nur en la tuta Hungarlando, precipe en ĝiaj sciencaj rondoj, sed ankaŭ en la tutmonda stenografistaro. Ciujn objektojn por l'Ekspozicio bonvolu sendi al la prezidanto de la *Organiza Komitato*.

Je l'nomo de *Organiza Komitato*

L. JAKAB,

Prezidanto de l'*Szegeda Stenografia Societo*,
Szeged (Hungarujo) Fertő-utca 4.

Z. BARANYAI,

Sekretario por gazetoj kaj por la Esperantaj aferoj,
Szeged (Hungarujo), III. ker. polg.

(*La gazetoj esperantistaj estas petataj represi tiun ĉi avizon*).

Bibliografio

Nova hungara propaganda libro.

A nemzetközi nyelv kérdése és az Esperanto, mint e kérdés legjobb megoldása. — Függelékül: *Az Esperanto nyelvtan áttekintése, szemelvényekkel és szótárral.* — Irta: ALTENBURGER ADOLF, tanár. — Szeged, Traub B. és társa, 1906. — Ára 50 fillér, postai küldéssel 60 fillér.

(La demando de lingvo internacia kaj la Esperanto, kiel la plej bona solvo de tiu ĉi demando. — Aldone: Resumo de la Esperanta gramatiko, kun elektaĵoj kaj kun vortaro.) — De profesoro ADOLFO ALTENBURGER. — Szeged, Traub B. kaj K^o, 1906. — Prezo 50 heleroj, kun poŝta sendo 60 heleroj.

Fine aperis libro propaganda jam tiel longe atendita de hungaraj Esperantistoj. La longa atendado alportis siajn fruktojn! En tiu ĉi verketo ni havas bonegan propagandan libreton, kompreneblan de scienculoj kaj malpli instruituloj same; libron, en kiu troviĝas ĉiuj interesaj okazintaĵoj pri la historio de nia kara lingvo; libron, kiu konvinkas; libron, kiu parolas al kapo kaj koro.

En la unua ĉapitro la aŭtoro, nia fervorega propagandisto, kies nomon certe konas niaj legantoj, parolas pri la celo,

ebleco kaj neceseco de lingvo internacia, kaj analizas la kondiĉojn de akceptebla internacia lingvo; ĉi tiuj estas: facileco, taŭgeco por esprimi ĉiujn ideojn kaj sencojn, facila kaj sammaniera elparolebleco, kaj bonsono. Poste (en aliaj ĉapitroj) li elmontras, ke la lingvo latina kaj la modernaj vivaj lingvoj naciaj ne estas taŭgaj havi la rolon de lingvo internacia, lingvo internacia povas esti do nur artefarita lingvo; tion ĉi jesigas la opinioj de scienculoj (Bacon, Paŝcal, Descartes, Comenius, Leibniz, Voltaire, Diderot, Condillac, Withney, Ampère, Nietzsche, grafo Stefano Széchenyi [famekonata hungara politikisto kaj scienculo], M. Müller, Internacia Lingvistika Societo). Plie detale li pravas, ke en lingvo internacia artefarita *Esperanto* troviĝas ĉiuj kondiĉoj de ideala internacia lingvo, post tio ĉi li komunikas opiniojn de kelke da scienculoj kaj verkistoj (L. Tolstoj, M. Müller, Adelsköld, Amerika Filozofia Societo, Jules Verne ktp.) pri Esperanto.

En la sekvanta ĉapitro li rakontas la naskiĝon de Esperanto (ĉi tie li parolas pri D-ro Zamenhof), poste li daŭrigas la detalan historion de Esperanto. Pri la Boulogne'a kongreso li en aparta ĉapitro parolas detale, tion ĉi sekvas ĉapitro pri la nuna stato de Esperantismo (gazetoj, Esperantistoj, ekspozicioj, kluboj, Esperanto en universitatoj kaj en aliaj lernejoj; Esperanto inter la blindularo ktp.), poste li parolas pri la stato de Esperanto en la komerco, kaj li pravas, ke Esperanto jam nun estas vera viva lingvo (vojaĝoj ktp.)

La sekvanta ĉapitro estas *Historio de Esperanto en Hungarlando*, de s-ro G. Bálint, tra s-roj MILETZ, LENGYEL, THOLT ĝis s-ro MARICH, kaj la pioniroj de Esperanto en la provinco. En tiu ĉi ĉapitro li kritikas kelkajn hungarajn malsaĝoplenajn sciencajn (?!) artikolojn parolintajn pri Esperanto.

Tion ĉi sekvas la resumo de l'Esperanta gramatiko. Bedaŭrinde la presejo ankaŭ ne havante Esperantajn literojn sursignitajn, devis anstataŭi: ĉ per *cs*, ĝ per *dzs*, ĵ per *zs*, ŝ per *sh*. (Tiu ĉi anstataŭigo ŝajnas al s-ro Altenburger pli bona, ol tiu per aldono de *h*, ĉar hungaroj pli bone povas legi ilin.) Tiu cirkonstanco multe malfaciligas la lernadon de Esperanto. Post la bonega gramatiko sekvas elektaĵoj el la Esp. literaturo (el letero de s-ro GIAMBENE, el *La Tisza* de JÓKAI, *La negro*, el la unua kanto de *Iliado*, el la dua kanto de *Eneido*, el *Tragedio de*

l'Homo de E. Madách) kun vortareto por, povi traduki ilin hungaren.

Ni petas niajn samideanojn, precipe la hungarajn, bonvolu fari grandan agadon por la disvastigado de tiu ĉi sola kaj bonega propaganda libreto hungara. (Vendebla ĉe la aŭtoro, P-ro Adolfo Altenburger, Szeged, Hungarujo.)

Z. BARANYAI.

Esperantaj lerniloj por Bohemoj.

Estas nenia dubo, ke povas al ni sufiĉe helpi, se oni parolas pri nia afero en konversaciaj lecionoj aŭ ne oni enkondukas la verkojn pri esperanto en kolektajn bibliotekojn, ĉu ili estas sciencaj, ĉu popularaj. Tiaj kolektoj havas ordinare sian sferon da aĉetantoj aŭ abonantoj, kiun multfoje ne enirus la memstaraj verkoj esperantaj. El tiaj bohemaj bibliotekoj du jam vastigas sian kolekton per libroj pri esperanto. « Malá Knihovna » (Malgranda biblioteko; simila al germana « Miniatur-Bibliothek ») preparas (kiel mi ekscias) la lernolibreton de Vymafal (en 2-a eld.) kaj « Pokladnice praktických vědomostí pro život » (Trezoŝejo de praktikaj sciaĵoj por vivo) ĵus eldonis la interparoladojn esperante-bohemajn: *Rozmluvy esperantsko-ceské s úvodem a mluvnicí. Napsal Lud. Pilný. Pokladnice praktických vědomostí, svazek 25. Cena 20 h. (in-16°, pĝ 48)*: La broŝureto « prezentanta revuan kolekton de plej ordinaraj frazoj en la plej diversaj bezonoj de vivo » konsistas el 4 ĉapitroj: post iom fanfara *Enkonduko* (pĝ 1—3), lerte redaktitaj *Gramatiko* (4—6) kaj *Vortfarado* (7—11), sekvas *Interparoladoj* (12—48), laŭŝablona kolekto de diversaj frazoj, kiujn oni ordinare — ne parolas, kolekto da frazoj de lingvo neviva, sed — kabineta. La aŭtoro estas eble lerta Esperantisto, sed ne tro lerta verkisto de — konversaciaj libroj, kiel montras precipe §§ 18. (Banejo) kaj 29. (Promenado); tiel oni ordinare ne parolas. Bona estas § 25 (Lingvo). Koncerne lingvon: nepardonebla eraro estas sur pĝ 43, kie la sensenca akuzativo (en linio 16) vokas dian venĝon! Sur pĝ. 13 (l. 7) mi plivolonte vidus *tio*, sur pĝ. 16 devas esti *dankeco* kaj *danka* (vidu bonan rimarkon de « Tedulo », L. I. XI, 189), pĝ. 26 *en la strato*, pĝ. 27 (l. 4) *kiu* (= ktery, kia = jaky), pĝ. 32

foresto (ne: malesto), pĝ. 38 *lerteco*. Krom tio la aŭtoro intermiksas la vortojn *loko* kaj *placo*. Kompreneble ne mankas preseraroj: sur pĝ. 9 devas esti *ludema*, pĝ. 14 *malkonsentu*, pĝ. 21 *malsaneta*, pĝ. 30 *blankan*, pĝ. 33 *tiu*, pĝ. 34 *musíme*, *nehceme*. Ne tro logika estas diro (pĝ. 3), ke la direkton montras akuzativo (ĝin montras finiĝo-n!). Por 48-paĝa broŝureto certe sufiĉe da eraroj. Malgraŭ tio la verketo povas alporti utilon inter malpli kleraj sferoj, kiuj amas similajn oportunajn eldonadojn. Laŭ la atentigo (pĝ. 48) rekomendanta elvenditajn vortarojn estas videble, ke la aŭtoro ne sekvas tro zorge nian movadon, kiel ŝajnus el Enkonduko.

H. K. B.

Monoferoj por la Blinduloj.

S-ro Bricard 3 fr., — F-ino Warluzel 10 fr., — Grupo de Rouen 10 fr., — Eldonado de diversaj tradukoj de « Premières Leçons » 310 fr., — Vendado de libroj 6 fr. — Sumo 339 frankoj.

Al ĉiuj koran dankon!

S-ro **CH. VERAX** tre petas, ke oni ne adresu je lia nomo la leterojn, kiuj koncernas la firmon **Preso Esperantista Societo**.

La leteroj, kiuj koncernas lin persone, devas esti adresataj al **Ch. Verax, 74, rue Claude-Bernard, Paris.**

Presejo de la **Preso Esperantista Societo**, 33, rue Lacépède, Paris

Administrantaro: **Th. Cart**, prezidanto; **Paul Fruictier**, delegito;

Pro **Benoit**, **D^{ro} Vallienne**, membroj.

Sekretario de l'adm.: **V. Chaussegros**. — Teknika direktoro: **Lengyel Pál**.

L'Imprimeur-gérant: **P. Fruictier**



INTERNACIA SIGNO

aprobata de grupoj kaj societoj en Kanad-, Anglo-, Belg-, Franc-, German-, Hispan-, Aŭstro-, Fin-, Itallando, Siberio k. a. rekomendata de S. F. p. p. E., butontra, broĉa, kravata, ricevebla ĉe ĉiuj Grupoj Esperantistaj : 1 franko. — Rabato al la grupoj por almenaŭ 12 : 20 0/0. — Sin turni al S-ro

Emile P. GASSE, 105, Lycée, Le Havre, Franclando.

ADRESARO DE KOMERCISTOJ

akceptantaj uzadon de Esperanto.

AVIZO. — La unua enpreso estas senpaga ; ĉiu nova enpreso kostas 50 centimojn, dekdu presoj = 5 frankojn ; por niaj abonantoj : 12 presoj 2 frankojn.

Paris, 33, rue Lacépède, — *Preso Esperantista Societo*, entreprenas la faradon de ĉiuspecaj presaĵoj.

Glasgow, 137, West Regent Street, — *Tabaka Sindikato Esperantista*. — Specialaĵo : « CIGAREDO ESPERANTO ». — Telegrafa adreso « Verdastelo, Glasgow ».

Barcelono (Hispanujo), Puerta-Ferrisa, 30. — *Johano Rosals*, librovendisto. Vendado de Esperantaj verkoj. Specialaĵo en libroj kaj utilaĵoj por lernejoj.

Valence d'Agen (France), — *Alfred Gérin*, posedanto de vinberejoj. Bonaj vinoj familiaj naturaj. Prezaro kaj specimenoj afrankite laŭ peto.

Hódság (Bács-megye), Hungarujo, — S-ro *Molnár Gyula*, deziras interŝanĝi kolektojn da papilioj kun loĝantoj de tropikaj landoj ; interŝanĝas ankaŭ elŝtopitajn (remburitajn) birdojn.

Paris, IV-e, 17, rue du Temple, — *Fernand Blangarin*, reprezentanto por vinoj. Bonegaj vinoj el Bordeaux, Beaune, Madeira, Malaga, O Porto. — Rumoj. — Peti prezaron kaj specimenojn. — Forta rabato por Esperantistoj.

Genève, 18, strato de la Mairie. — *Komerca Oficejo Esperanta*, Ed. Dick. — Akceptas riprezentadojn komercajn de ĉiuj landoj.

Prof. WREN J. GRINSTEAD, *Richmond, Kentucky, U. S. A.*, volonte interŝanĝos revuojn amerikajn por francaj kaj germanaj (ĉiuj presitaj en la naciaj lingvoj nomitaj), kaj korespondados letere (esperante) kun la sendantoj pri iaj nuntempaĵoj.

LA REVUO

Internacia monata literatura gazeto
kun la konstanta kunlaborado

de D-ro L. L. Zamenhof.

Tiu nova Revuo, tute redaktata en Esperanto, estos pure literatura; ĝi enhavos novelojn, romanojn, poeziojn, komediojn, dramojn, seriozajn studojn pri historio, geografio, statistiko, popolmoroj, k.c., kronikon tre mallongan pri la ĉefaj mondaj okazintaĵoj, bibliografion.

Ĉio politika, religia, aŭ kio povas naski disputojn, estos malakceptata de la Redakcio.

D-ro L. L. Zamenhof *sola* povos verki artikolojn pri la *lingvo*.

La 1-a numero aperos la 1-an de septembro 1906, okaze de la II-a Universala Kongreso de Esperanto.

Kosto : ĉiu numero 0 fr. 50
jara abono 6 fr.

ONI POVAS ĜAM DE NUN ABONI

ĉe la Librejo **HACHETTE kaj K-o,**
79, Boulevard Saint-Germain, **Paris.**

LA INTERNACIA TRINKAĴO !

Viskio Esperanto

Registered trade mark

N° 270,042

Marque déposée

N° 13,195

Registered label N° 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **Esperanto** sur la afiŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

BUCHANAN, SCOTT & Co

Garthland street,

GLASGOW (Skotlando).